



**La Brita
Esperantisto**

Januaro-Februaro 1984

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAJO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

80/A Jaro, N-Ro 856

Januaro-Februaro 1984

Eldonas:

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £8.00 (£5.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn ‘Esperanto News’ kaj ‘La Brita Esperantisto’. Abono nur al “La Brita Esperantisto” estas £4.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, ‘intensive’ kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF ĉ kun afrankita mezgranda koverto.

Form of Bequest

I give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

LA VERDA NACIO

Antaŭ kelkaj jaroj bonkonata politikisto diris ke por esti nacio sendependa oni bezonas tri erojn: flagon, himnon kaj aerlinion. Laŭ tiu kriterio Esperantistoj jam estas bona distanco laŭvoje al sendependeco. Homoj ne tiel skeptikaj kiel politikistoj povas dubi la ekziston de la Verda Nacio. Do, ni analizu ĉu tiu ekzisto estas pli ol hipotezo aŭ revo.

Kia popolo estas la Verda Popolo? Ĝi estas tiu amaso da homoj kiu per unu lingvo interkomprenas kaj apartenas al kultura vivo bazita sur certa universal-eco kies trajtoj, tendencoj kaj moroj estas malsimilaj al iu ajn alia kulturo de la mondo. Jam du sociologaj studoj pri ĉi tiu popolo aperis ĝisdate, kaj ili ambaŭ en la lastaj du jaroj. La studoj estis verkitaj en fremdaj lingvoj, pro tio ĝis tradukoj aperos en nia lingvo ne eblos al ni, verdanoj, komenti pri la verkoj nek aserti kiel trafe ili pritraktas la verdajn morojn kaj karakteron.

La Verda Nacio ne havas landon kiun oni povas klare difini sur monda mapo kaj montri ĝin per speciala koloro. La nombron de anoj kiuj formas tiun nacion estas malfacile kalkuli. Ili troviĝas tra la tuta globo kaj ankoraŭ ne ekzistas censo pri ĉi tiu popolo, pro tio sociaj sciencistoj kaj filologoj povas nur taksii la nombron de la anoj. Tiuj taksoj varias inter unu miliono kaj dek milionoj, depende de la antagonismo aŭ simpatio de la esplorantoj rilate al la Nacio. La reala nombro, preskaŭ certe, estas meze de la du ekstremoj. La fakto ke la popolo ne havas propran difinitan landon estas mistero por la sociologoj. Estas ekster ĉiu tradicia socia normo, ke homoj disvastigitaj tra la globo povas formi nacion nur per kulturo bazita grandparte sur libere fluanta poezio, per mistika interna ideo kaj laŭ kosma dinamismo de kvinpinta verda stelo.

La anoj de la Nacio estas troveblaj en malgrandaj grupoj kiel etaj kolonioj inter la amaso de oficial-lingvaj parolantoj. La oficial-lingvoj dependas de la ŝtato en kiu la koloniitoj troviĝas. Sociologoj kaj studentoj de internaciaj aferoj konstatas ke kolonioj kaj grupoj parolantaj lingvon ne oficialan ekzistas en multaj partoj de la globo. La fenomeno de la Verda Nacio konsistas en tiu fakto ke la lingvo ne estas etna lingvo parolata de iu etna minoritato. Tiuj Verdaj grupoj kaj kolonioj havas sian propran vivstilon. Ili elektas reprezentantojn al Verdaj provincaj aŭ ŝtataj konsilioj. Fine tiuj ŝtataj konsilioj sendas reprezentantojn al la monda Verda parlamento, kiu kunvenas, preskaŭ senhalte, dum unu tuta semajno en urbo elektita de la centra registaro. La elekto de la urbo, kiu dum unu somera semajno estas la ĉefurbo de la Nacio, varias de jaro al jaro, pruvante la universal-ecan de la Nacio. La centra registaro, nomita Estraro, estas elektita ĉiun trian jaron de la reprezentantoj de pluraj ŝtatoj de la mondo, per sekretaj balotoj. Seriozaj observantoj de tiuj gigantaj renkontiĝoj de verdanoj miras pri ili, ne sciante ĉu nomi ilin popularaj cirkoj, seriozaj seminarioj kie sciencaj temoj estas prezentitaj al la adeptoj, artaj konkursoj aŭ specoj de olimpikaj amasrenkontiĝoj en la antikva helena tradicio, tamen sen la sportaj konkursoj.

La Verda Nacio havas, kiel jam dirite, la propran lingvon. Lingvo en kiu aperas kvanto da revuoj, magazinoj kaj libroj, ĉar la verdanoj legas kaj verkas avide. Ankaŭ estas kantoj kaj legendoj pri pioniroj de la Nacio. Malgraŭ la ofta aserto de la nacioj pri homa paco kaj harmonio, la kutimaj argumentoj, kvereloj kaj disputoj ne estas malkonataj. Observantoj nekonantaj la lingvon trovas tiujn disputojn nekom-

preneblaj. La disputoj neniam estas pri politikaj principoj de la Nacio, sed pri strangaj argumentoj pri ata-ita, ujo-io aŭ pri neŭtraleco, ideo kiu obsedas la anojn. Tiuj disputoj ne estas tiel diferencaj de tiuj kiuj okazas en pli aĝaj nacioj, kiel je la unua momento ŝajnas. La manko, aŭ preskaŭ-manko, de klas-tavoloj kaj la sento de egaleco inter la anoj ne kreas terenon fekundan por la kreskado de akceptitaj fontoj por disputoj kaj bataloj. Tio estas la kaŭzo pro kio ili devas trovi abstraktajn temojn por sin dorloti per la homa emo al kvereloj de tempo al tempo. Ke tiu abstrakteco ne estas komprenata de ortodokse tradiciaj sociologoj ne fortiras iun ajn valoreton el la principoj de la verda nacieco.

Eksterordinara aspekto de ĉi tiu popolo estas ke dum la elektoj por konsilantoj kaj regantoj lokaj aŭ regionaj

kaj eĉ por komitatanoj kaj estraro de la globa Konsilio, oni neniam parolas pri la fiskaj rimedoj. La altigo aŭ malaltigo de impostoj, sub la nomo de kotizoj, neniam aperas en la manifestoj de la kandidatoj.

Mankas aerlinio al la Verda Nacio, sed ĝi posedas ĉiun alian esencan fundamenton de vivanta nacio. Ĝi havas lingvon propran kaj kulturon. La lojaleco kaj fervoro de la nacioj estas modela. Folkloro abundas, kaj flagojn oni flirtigas entuziasme. La himno estas emocie kaj respektoplene kantata en renkontiĝoj de la nacioj. La armeo konsistas el nearmitaj pacaj batalantoj kiuj defendas ĝin senhezite kontraŭ iu ajn blasfemo de impertinentuloj. Leviĝu la standardoj kaj eksonigu viajn voĉojn samnacionoj: *“En la mondon venis nova sento”*

Alariko



Londona Esperanto—Horo (Foto: Peter Oliver)

Nia Kovrilbildo:

KVINDEK JAROJN DE ESPERANTO

Veterana Esperantisto, Frank Buckley, angla advokato, jubileas sian sepdekan jarfeston per rondvojaĝo al grupoj kaj kunvenoj multelandaj, donante sian lumbildan kaj magnetofonan prezentadon "Kvindek Jarojn de Esperanto".

Frank ĉeestis sian unuan internacian kongreson je Köln en 1933. Li jam lernis la lingvon per angla "penny Key" – simpla ŝlosilo al Esperanto aĉebla tiam po unu malnova angla penco. En la sama jaro li kotizis al la Brita Esperanto Asocio kaj la Internacia Esperanta Ligo. Li poste sekvis instruistan kurson je la Cseh instituto en Arnhem.

Li sukcesis la ekzamenojn por la Diplomo de la Brita Esperanto Asocio en 1942 kaj en 1949 la B.E.A. kaj la I.E.L. al li donis la honoron de vivmembro. Li estas nun vivmembro de la Esperanto-Asocio de Britujo kaj la Universala Esperanto-Asocio kaj estis fakdelegito (Juro) en Bristol ek de la nuna formo de la Jarlibro ĝis nun.

Li verkis kaj tradukis multe da dramoj kaj komedioj kun muziko, kaj gesamideanoj rememoras "Neĝulino", "La Feliĉa Familio", "la Ĉeĥoslovaka Porko" kaj "Maria Marteno" prezentatajn je kunvenoj kaj konferencoj en multe da landoj kaj per Prague Radio disvastigitajn.

Li prezentis tradukojn de la dramoj de Ŝakspiro – "Hamlet" sur la remparoj de la kastelo de Elsinore dum kongreso en Danlando kaj "La Songo de Mezsomera Nokto" je Brita Kongreso.

Dum la Brita Kongreso en Weston-Super-Mare en 1939 li direktis esperantan antologion kaj komponis esperantan uverturon "Esperantiana" por simfonia orkestro.

Frank estas gastronomiisto kaj spertulo pri la vino – li estas Majstro de Vino kaj Presidanto de la Vina Societo – kaj

dum siaj vizitoj al grupoj li esperos gustumi denove la regionajn pladojn kaj vinajn trezorojn kiujn li bone rememoras.

Li multe laboris je Esperanta propagando kaj instruis kaj verkis por la movado. Li ankaŭ laboris multe por la Ruĝa Kruco kaj estis *Assistant Director* de la Brita Ruĝa Kruco Societo, vizitante multajn landojn kun helpo dum inundadoj, tertremoj kaj aliaj katastrofoj.

Diplomito de Bristol Universitato li estas prezidanto de studentoj (*Chairman of Alumni*). Li studis juron en Gray's Inn kaj estas advokato (*Barrister-at-Law*) de la Middle Temple. Li estas membro de Lincoln's Inn.

Frank estis korespondanto kaj amiko de multe da Esperantistoj kiuj rememoris Zamenhof antaŭ lia morto en 1917 kaj la prezentado revokas la naskiĝajn tagojn de la Movado de la apero de la Unua Libro de Esperanto en 1887.

Grupoj kaj societoj kiuj deziras viziton de Frank Buckley dum 1984 povas skribi al li: 620 Filton Avenue, Bristol. BS12 7LD. Britujo.

B. E. S.

LONDONO ZOKAS

La historio de la unuaj 75 jaroj de la Londona Esperanto-Klubo, verkita de Harry Holmes.

A5, kun 132 paĝoj kaj multaj ilustraĵoj.

£3, aŭ ekvivalento. Mendu ĉel BEA, UEA, ĉe via libroservo aŭ rekte de la Londona Esperanto-Klubo, 153 Drummond Str., London NW1.

Ĝirokonto 54 661 0005.

LAŬ MIA OPINIO . . .

Junuloj en Kongreso

En la lasta "Brita Esperantisto" John Brownlee prave opinias, ke ĉeestis tro malmulte da junuloj por pravigi la kondukon de la balo dum la brita kongreso. Sed demandu, kial estas tia malekvilibro de nombroj de la partoprenantoj. La respondo estas, ke nun-specaj Britaj Kongresoj ne estas sufiĉe interesaj por junuloj anstataŭe ili plejparte ŝparas sian monon por iri al aliaj aranĝoj.

La forpelitoj estis jam dum multaj jaroj la junuloj, ne la aliaj personoj dum tiu balvespero en Manĉestro. Tamen, se la kongreso estas vere de ĉiuj britaj esperantistoj, ĉu tio ne estas malfeliĉa stato?

Mi konsentas, ke la muziko estis tro laŭta. Certe la balo ne povas esti regata de la junularo, sed ankaŭ ne de iu alia grupo en la kongreso.

S-ro Brownlee proponis kompromison, sed tuj poste priskribis la situacion en ĉiu kongresbalo laŭ mia sperto.

Mi memoras la vortojn de s-ro Don Lord en la maja/aŭgusta numero de BE: "Kaj se la maljunuloj tro insistas pri tradicioj, la junuloj foriros, kaj la maljunuloj formortos".

Tio estas maltrankviliga ideo sed estas prava.

Mi diras al la organizontoj de Britaj Kongresoj: ni havu *veran* kompromison, ni havu kongresojn de *ĉiuj* britaj esperantistoj kaj ni tenu la movadon vigla kaj vivanta.

Michael Ranshaw

Infanaj kongresetoj

Mi legis la interesan artikolon de Ian Fantom, sed lia aserto ke en kongresoj "oni tutsimple ne pensas pri infanoj aranĝoj" postulas respondon.

Certe en kelkaj antaŭaj jaroj Infana Kongreseto estis kutima parto de la aranĝoj. Ekzemple, 1971 en Weston-super-Mare (prizorgis Raif Markarian), 1975 en Leamington Spa (Dot Fern), 1976 en Chester (mia edzino, Betty).

Inter la aranĝoj en Chester estis Trezor-serĉado (kun, kompreneble, indikoj en Esperanto), promenoj, ekskursetoj, en- kaj ekster-domaj ludoj. Oni asignis monon por la aĉeto de diversaj ludiloj – raketoj, pilkoj, volanoj, kriketa kompleto, ktp, papero, kraĵonoj. La ludiloj, kune kun neuzitaj papero kaj kraĵonoj, estis transdonitaj al la reprezentantoj de la venonta kongreso (kiun, bedaŭrinde, ni ne povis ĉeesti).

Kompreneble, la supre menciitaj kongresoj okazis antaŭ la alveno de la bonaj Fantomaj infanoj! Pri lastatempaj kongresoj la aserto ŝajne pravas.

Ray Smith

His Law Language

Legante la artikolon – "Kiel James Joyce Lernis Esperanton" (BE sep/okt 1983), novaj Esperantistoj misinformiĝas pri la vorto "edzo". Ili, kaj la aŭtoro, vidu paĝon 28 en "Lingvaj Respondoj" de D-ro L. L. Zamenhof.

La komento en la artikolo pri "sh" kaj "ch" ankaŭ misinformas novajn Esperantistojn. D-ro Zamenhof konsilis la uzon de tiuj en la fruaj tagoj de Esperanto, *por presistoj*, "nur kiel necesan unuatempan rimedon". (LR paĝo 46).

Cetere, la titolo estas trompa. La artikolo informis nin ne kiel James Joyce *LERNIS* Esperanton sed kiel li ĝin *UZIS*, (pli vere misuzis ĝin), en sia romano "Finnegans Wake".

Arthur Jackson.

KURSOJ EN BELSTEAD HOUSE

24 - 26 Februaro 1984

Tri kursoj de Esperanto okazos en Belstead House, Ipswich, de la 24a ĝis la 26a de februaro. La instruontoj estas:

Komencantoj: John Brownlee

Mezgrada: Myrtle Green kaj Stephen Thompson

Altgrada: Don Lord

Petu senprokraste aliĝilon kun plenaj informoj de: The Secretary, Belstead House, via Sprites Lane, Ipswich IP8 3NA.

LA PROLOGO KAJ RAKONTO DE LA PARDONISTO

Geoffrey Chaucer

el la mezepoka angla trad. T. Fraser

La Rakonto

Flandruje iam, estis kunularo,
Junuloj, dronaj en folega faro –
Tumultoj, vetludad' en fi-tavernoj,
En kiuj harpoj, citroj, laŭ alternoj
Instigis daŭre kubĵetadon, dancon,
Drinkadon supersatan, same manĝon,
Per kio servis ili al Satano
En ĉi diablotemploj de profano,
Per trokonsumo ege kondamninda.
Sakrad' ilia estis plej damninda,
Ĝin nur aŭdante la animo nigras,
La Sanktan Korpon tiel ili ŝiras –
Ĉu ne sufiĉis jam ŝirad' sur kruco?
Kaj distris ĉiun la alies buŝo.
Jen venis junaj dancistinoj sveltaj
Kaj tentaj frukt- kaj kant-istinoj lertaj,
Dolĉaj-vendistoj kaj bordel-perantoj –
Diabloservaj fi-leŭtenantoj
Por krei kaj stimuli al lascivo:
Ĉi ĉio estas el glutemo la derivo.
La Sankta Skribo pruvas mian tezon,
Ke la ebrio kaŭzas malĉastecon:
Jen Lot pro la ebrio kuŝis, fia
Kun propraj du filinoj, tutsenscia
De vin' pri tio kion li ja faras:
Herodo, kiel Sankta Mark' deklaras,
Festante, pli ol sata de la vino,
Ĉetable cedis pri la sanga fino
Maljusta, kontraŭ la Baptist' Johano:
Seneko prave skribis, sen ĉikano,
Ke ne troviĝas ajna diferenco
Rilate al la homa malordmenso
Kaj homebri' en ĉiu korpangulo,
Krom ke frenezo, ene de povrulo
Pli longe daŭras ol ebriostato.
Ho glutemo, vojo al la malbeato,
Kialo de la el-Eden-kondamno,
Ho kaŭz' unua de la homodamno
Ĝis sangis Krist' por nia elaĉeto:
Ho karan prezon kaŭzis tiu peko,
Koruptis ĝi la tutan mondon vere,
Pekajo ĝi, veninta elinfere.

Adamo, nia patro, ankaŭ Eva
Peliĝis el Eden' al vivo vea,
Sendube ĉar li tiel glutopekis,
Ĉar dum li fastis, kiel mi ja legis,
Li loĝis Paradize, ĝis li glutis
La ne-manĝendan frukton. Sekve tujis
Elĵeto, ada veo kaj doloro.
Ho glutopeko, inda je priploro!
Se sciis homo, kiom da malsanoj
Tromanĝo kaŭzas al la korporganoj,
Modera pli, li certe nepre estus,
Ne manĝus troe li, eĉ se li festus.
Ho ve! la eta buŝo, kurta gorgo,
Devigas homojn de la sud' ĝis nordo,
Sur ter' kaj maro ĉiam penlabori
Por ke glutul' nur fajnan manĝon voru.
Ĉi-teme pravas Sankta-Paŭl-aserto:
'Al ventro, nutro; kaj por nutro, ventro,
Sed fine Di' detruos ambaŭ nepre'.
Ĉi temon estas fie nomi certe
Kaj l'ago mem ja estas eĉ pli fia,
Ke homo drinke igas sin ebria,
Ŝanĝante sian gorgon al kloako
Kun aĉe troa vino en stomako.
Sankt-Paŭlo weakore larme diris,
'Iradas multaj, kiel jam mi skribis –
Plorvoĉe kaj bedaŭre ĝin rekonas –
Ke ili l' krucon Kristan tut-oponas
Do mortos ĉar la ventro iĝis Dio'.
Ho ventro! ho karno! Ho fio,
Ŝtopita feke, ho koruptoplana:
El ĉiu fino, spiro abomena.
Kiomas pen' kaj prezo vin provizi?
Kuiras oni ĉiel por vin tikli,
Ŝanĝante puran nutron ĝis orgio
Indulge al la peka manĝrabbio!
Elbatas oni, el la duraj ostoj
Medolon: ĉion el bakad' aŭ rostroj
Retenas, ke l' gluto glatu al stomako.
Folio, ŝel', radiko, estu fako,
Spicfonto por postula gastronomo,
Kaj saŭco, cela al ĝuaĉokromo.
Sed nepre, kiu tiajn pekojn frandas
Jam teron de la aĉa morto plandas.

(daŭrigota)

Notoj

146 La eklezio tre kondamnis sakradon je la Krista korpo, nomante ĝin rekrucumo de la Savinto.

NOVAJ LIBROJ

La lingva esenco de Esperanto. Atanas D. Atanasov. UEA Rotterdam 1983. 126 p. 21 cm. Prezo £6,60 afrankite.

“Ĉiu lingvo havas *sian* logikon”, diras Atanas Atanasov, kaj la manko de Montagu Butler estis supozi, ke ekzistas iu senkondiĉa logiko lingva, kio kondukis lin apliki maltrafe al Esperanto logikon propre anglan.

Atanasov, slavo kiu lernis Esperanton en 1908, kunlaboris je la Enciklopedio kaj verkis originale kaj traduke, proze kaj poezie, nun venas al lingvaj demandoj kun klero larĝa kaj profunda kaj antaŭ ĉio kun lingva sento nutrita en la viva verkado. Jen li parolas pri fonetiko: “Mi devis klarigi, ke t, s, kaj c estas tri apartaj fonemoj, diferencaj laŭ sonado; do *kat-simila* absolute ne estas *kacimila*; tiel ankaŭ *kotŝirmilo* ne estas *koĉirmilo*”. Atentu, angloj, kiuj jardekon post jardeko lernas nur la proksimumon, ke c = ts, sen la averto “prononcata kiel unu sono”, simile kiel ĉ = tŝ unusone prononcata.

Pri ata-ita li atentigas, ke -ata rilatas ne sole al ago rigardata dum plenumo, sed ankaŭ al ago kutima aŭ ripeta kvankam ĉiu fojo estas laŭvice plenumita: “La gazeto estas redaktata en Skotlando kaj presata en Brazilo”. Ignoro de tio kondukas al multa trouzo de -ita. Valora estas lia pritrakto de sinonimoj. Ili estas ja gloro de nia lingvo, kaj ĉiu sperta esperantisto havas siajn traŭbojn de similsencaj vortoj: fleksebla – elasta – plastika; speciale – aparte – precipe – ĉefe; sendependa – memstara – aŭtonoma.

Prave li montras en alia ĉapitro la koncizan esprimovon de interjekcioj: hm – dubo, hezito; ej – averteto; ta, aŭ ta ta – senpacienco; hu – timo, surprizo; aj – subita doloro (aŭ akra ĝojo); be – konfuziĝo; oj – malĝojo; ve – bedaŭro; aĥ – sopiro ktp.

Pri la ĝena vorteto *po* li argumentas simple kaj sagace. Mankas nur unu konstato: ke en la kutimaj konkurencaj for-

moj a) Li donis al la infanoj po unu pomo, kaj b) Li donis al la infanoj po unu pomon, la esperantistoj klare demonstras, ke ili sentas *po* jen kiel prepozicion, jen kiel adverbon. Kaj vortoj kun du gramatikaj kategorioj ja ekzistas, ekz. *anstataŭ, dum* – aŭ *ĉirkaŭ*: prepozicio, kiu en la frazo: Li veturis ĉirkaŭ tri mejlojn – fariĝas adverbo (= proksimume).

En alia ĉapitro A.D.A. alportas la voĉon de l’ prudento al la tro dogmema kondamno de H.A. de Hoog pri “kiom-tiom” ĉe adjektivoj.

En *la arto traduki* li saĝe diras: “Por fari bonan tradukon estas necese: 1) koni perfekte la du lingvojn; 2) posedi bonan propran stilon en la traduka lingvo”. Pri la *emocia enhavo* de la verko li diras: “La problemo estas solvota indidue de la tradukanto, laŭ lia propra sento pri lingvo kaj stilo”.

Krom tio Atanasov skribas pri la vortfarado, propraj nomoj, interlingvistiko kaj multo alia.

Tiuj ekzemploj ilustras kiel valora kaj grava estas *La lingva esenco de Esperanto* por ĉiu supera studanto de la lingvo. Eĉ se vi ne konsentas pri ĉiu detalo (ankaŭ mi ne), vi trovos la tuton riĉe profitiga kaj pensiga.

R. Rossetti

Kaj la ceter’, - nur literaturo. G. Waringhien. TK-Stafeto. 350 paĝoj. £11.13 inkluzivas sendokoston.

Recenzi libron de Waringhien estas malfacila tasko. Ĉu eblas skribi vorton kritike al unu el la gigantoj de nia literaturo? Kompense la tasko estas plezurplena, ĉar la legado de interesa libro ĉiam estas agrabla okupo. Waringhien estas jam konata kiel gramatikisto, vortaristo, poeto kaj eseisto. Ĉi tiu libro aldonas pluan kolekton de eseoj al la jam aperintaj. La unuan kolekton eldonis “Stafeto” en 1956, sekvis tiun volumon pluaj kvar. Ĉi tiu estas la kvina kaj, laŭ la antaŭparolo, ĝi estos la lasta. Oni esperas ke ne!

Waringhien estas ĝis nun la plej fekunda eseisto. Per la antaŭaj kvar vol-

umoj li jam montris kiel bone li regas ĉi tiun verkoformon kaj kiel vasta estas la kampo de liaj interesoj. La nova volumo konfirmas ke la aŭtoro restos kiel elstara eseisto en nia literaturo. Ne estos facile konkurenci kun li. La eseoj, kiel jam scias tiuj kiuj legis eĉ nur unu el la antaŭaj libroj, estas verkitaj en bonega lingvostilo kaj, eĉ se oni ne konsentas kun ĉiu opinio esprimita, la lingvo estas tiel bela ke ĉiu profitos legante la eseojn de Waringhien.

Kaj la ceter', kiel diras la titolo, estas pri literaturo. En la kolekto troviĝas ankaŭ prelegoj kiujn li prezentis en pluraj kongresoj. Ĉu prelegoj ĉu eseoj, la erudicio de la verkisto klare evidentiĝas. Ne plu estas sekreto ke Waringhien estas Arieh ben Guni, la verkisto de la dua parto de "Libro de Amo" kaj kiu jam legis tiun libron konstatas kiom da lingvoj li regas. En la nuna volumo ni denove vidas tiun kapablon kiam la legantoj estas transportataj de unu literaturo al alia. Tradukoj el tiuj literaturoj abundas, kaj kritikoj pri tradukoj jam faritaj ne mankas. Por multaj legantoj la poeziaj teknikaj terminoj ne estos kompreneblaj, sed ili ne sin trudas en la intereson de la legantoj. En erudiciaj studoj iuj eraroj kutime evidentiĝas, eble pro troa memfido de erudiciuloj. Tio okazas ankaŭ al Waringhien. En paĝo 215 ni legas: "... jam cetere en la 'Romancero de l'Cido' de la 15-a jarcento ..."; ĝi ne estas *romancero* sed *romanco*, kiel li mem citas sur paĝo 938 de P.I.V. Ankaŭ la "Romanco de la Cido" estis jam malnova en la 15-a jarcento; ĝi estis verkita ĉirkaŭ la jaro 1140. Mi, persone, devis studi la poemon laŭ la manuskripto de 1307. Sendube iuj legantoj opinios ĉi tiun komenton kiel impertinentan!

En la eseoj oni perceptas certan memfieriĝon, eĉ orgojlon, de la verkisto. Agacas al mi la granda kvanto da piednotoj kiuj aperas en la libro, multaj el ili superflujaj. Li metas enkondukan citaĵon al ĉiu eseo. En paĝo 55 la citaĵo estas de Cyril Connolly. Se li estus inter ni kaj

vidus tion, li ridetus skeptike kaj la malgrandaj okuloj super la grasaj vangoj ĵetus koboldan rigardon plezuranta ĉar oni tradukis lin en Esperanton. Kiam mi laboris en la revuo "Horizon" kiel ĉiofaranto mi aŭdis Connolly kompari la Esperantistojn al serĉuloj de la konstanta movado!

La libro enhavas eseon "Tri Stiloj de Recenzado". Mi sekvis neniun el tiuj stiloj. La Redaktoro ne donos al mi tiom da paĝoj!

Amador Diaz

La Fontoj de Esperanto. D. B. Gregor. (dua eldono). Broŝuro kun 24 paĝoj da teksto. Prezo £1.60.

La Antaŭparolo estas la sama kiel tiu en la unua eldono (1956). Ĝi indikas, ke la libreto estas por tiuj, kiuj deziras, ne nur ke ili povu uzi la lingvon flue kaj senerare, sed ankaŭ ke ili havu profundan scion pri la esencaj trajtoj de ĝi – tian scion, kia donus al ili kapablon uzi la lingvon kun ĝusta stilo, kaj inde subteni kaj rekomendi ĝin okaze de argumentoj aŭ diskutoj kun kleruloj. La aŭtoro skribis: "Oni pardonu tion, ke la verko estas kompilita laŭ la iom severaj normoj, kiuj gvidas verkadon de iu ajn libro destinita por profesiaj fakuloj. La digno de Esperanto meritas tion". La kvalifikoj menciitaj de la aŭtoro, kaj konfirmitaj de lia prestiĝo inter liaj kolegoj en la Akademio, garantias lian kapablon tion fari.

La Enkonduko parolas pri la difina artikolo, slavaj trajtoj en Esperanto, kaj iom pri la supersignitaj literoj.

- p. 8. Sub la titolo "Fonetiko" estas pritrakto de diftongoj, vokaloj, kaj la cirkumflekso kiel supersigno, kaj ilia apero en kelkaj etnaj lingvoj.
- p. 9-14. Sub "Morfologio" la aŭtoro detale parolas pri la formo kaj deveno de ĉiuj gramatikaj elementoj en nia lingvo, kaj ofte li indikas la problemojn, kaj la motivojn, kiujn Zamenhof havis por la alpreno de ili. Demonstrita estas la rimarkinda internacieco de la lingva strukturo de

Esperanto. La genio kaj lerteco de Zamenhof estas klare evidentaj.

Vide al la nuntempa feminista propagando por seks-distingaj aldonajoj al nia lingvo, la jena paragrafo sur p. 9 havas apartan gravecon: “*Vortgenro*: Ke malgraŭ la tri vortgenroj de la Rusa, Pola kaj Germanaj lingvoj ĉi tio tute mankas al Esperanto, pruvas kiel neligita Zamenhof restis al siaj kutimaj lingvoj. La principo de maksimuma facileco necessigis la forĵeton de ĉia balasto”.

- p. 15-19 temas pri “*Vort-Trezoro*”. Cititaj estas la vortoj de Zamenhof mem, ke la vortoj de Esperanto “krom kelkaj tre malmultaj, ne estas arbitre elpensitaj, sed prenitaj el la lingvoj romana-ĝermanaj”, kaj li klarigas kial la vortoj de internacia lingvo nepre devas deveni de tiuj lingvoj. Do, la aŭtoro faras statistikan ekzamenon de la Universala Vortaro, por konstati ĝis kia grado tiu aserto estas vera, kaj por taksi tiel la tujan rekoneblecon de la Esperanta vort-trezoro. Li evidentigas la rimarkindan internaciecon de ĝi, kaj tial la fundamentan taŭgecon de nia lingvo por servi kiel la sola internacia lingvo.
- p. 20-21. Ĉi tie la temo estas “*Sintakso*”. La aŭtoro montras, ke ankaŭ ĝi havas internaciecon. Ĝi estas precipe slava, sed ne tiom pro decidoj de Zamenhof, kiom pro tio, ke “Esperanto solidiĝis sub la gvidado de slavaj aktivuloj en la unua periodo (1887-1895).”
- p. 22-25. Sur la antaŭaj paĝoj tie, kie notoj estus helpaj, staras sinsekve malgrandaj numeroj, 1 ĝis 86. La Notoj aperas sur ĉi tiuj paĝoj.
- p. 26-29. Ĉi tie estas Tabelo de la Lingva Distribuo de la Esperanta Vort-trezoro.
- p. 30. Indekso.
- P. 31. Ĉi tie estas listo de Fremdaj Vortoj Cititaj kun referencoj al la paĝoj sur kiuj ili aperas.
- Preseraroj. p. 9, 1.8 ĉiu devus esti ĉiuj p.

13, 1.15, dua kolumno, ĉe “em” 17 devus esti 27 p. 18 La Not-numero 58 aperas dufoje; en 1.4 kaj 17 Je la komenco de 1.17 bon devus esti bron p. 26, 1.7 enkalkuas devus esti enkalkulas

Sur p. 9, 1.12 mi legis: io “fine decidigis Zamenhof sekvi . . . la slavajn lingvojn”. Kiam mi rimarkis la forlason de la akuzativo ĉe “Zamenhof” mi volis krei “Bravo!” Pri la akuzativo Zamenhof permesis al si kaj al aliaj liberecon, ankaŭ pri la finaĵo -o ĉe propraj nomoj. Li ofte skribis proprajn nomojn sen -o, sed ĝenerale li aldonis -on (kun la streketo) al ili – miaopinie, tute necese. ĉar la vortordo klare indikas la akuzativecon de la nomo. Plue, la uzado de tiuj finaĵoj ĉe propraj nomoj, landaj kaj personaj, tre ofte kaŭzas mislokigon de ilia normala akcentado, kaj ĝia stranga ne-internacieco plejeble kaŭzas ĉe ne-Esperantistoj antaŭjuĝon kontraŭ la akcepto de nia lingvo kiel la sola internacia lingvo. La aspekto de la presita formo de Esperanto estas tre grava.

Sen ia hezitado mi tre varme rekomendas ĉi tiun libron al ĉiuj, kiuj deziras scii pri la fontoj, la naskiĝo, la strukturo kaj la animo de nia miriga kaj profunde internacia lingvo. Ĝi estas majstra verkaĵo, treege valora elmontrado de la elstara indeco kaj taŭgeco de Esperanto por plenumi ĝian honorindan kaj mondiskalan celon. La aŭtoro altgrade meritas la laŭdon kaj dankojn de ĉiu serioza gesamideano.

W. J. Downes

Iluzioj de Lorjak. Noveloj. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1982. Prezo 18 gld.

Estas agrable trovi kokektitaj ĉi tiujn dek novelojn, jam eldonitajn en diversaj magazinoj; novelojn varistilajn, varispece humurajn, tra kiuj progresantoj povas progresi kaj spertuloj distriĝi. La humuro estas nigra en “Malmorale”; nigre farsa en “Tik-tak” kaj “Urno”; sprite satira en “Ĝemeliĝo kaj “Simipapag”; simple ŝerca en “Av” kaj

“Aŭtoŝtelo”; kaj, precipe en “Iluzioj” kaj “Ŝŝ”, majstre miksa kun malĝoja kompreno pri la homa naturo. Tiom da vero kaŝiĝas sub la fantaziaj siluetoj kreitaj de Lorjak ke oni ne povas ne kompati ilin. Kortuŝaj estas la virino “poŝ-perfortita” (“Ŝŝ”) kaj la “idiota inversa situacio” de la iluziitaj kaj iluziintaj de la titolnovelo; la “piketa brunulineto kokerikstimula” (“Aŭtoŝtelo”) prezentas samtempe lecionon de vortfarado kaj de vortpentrado; la sinmortigonto (“Paf”), kiu hezitas por klarigi kial, pro kio aŭ pro kiu(j) li mortos, montras la eblecojn kaj de Esperanto kaj de la homa malracieco.

La volumo inkluzivas, de “J.L.M.”, francajn tradukojn de du noveloj, kaj, de Clarkson Crane, anglan tradukon de unu el tiuj, “Twin(n)ing”. Estas bedaŭrinde ke oni ne presis la francan version de “Ŝŝ” fronte al la esperanta; sed sendube por “Ĝemeliĝo”, dulingve tradukita, la problemo estis nesolvebla. Ankaŭ tie oni povas vidi la riĉecojn de Esperanto; ekzemple, la “sinmurdontoj” de “Ĝemeliĝo” povas iĝi angle nur “self-murderers” (tempo nuna aŭ pasinta) kaj france “désespérés” (malesperigitaj). En ambaŭ lingvoj, frazoj koncizaj kaj aludaj tiel kiel “formikejan vivon alportis la zigzagoj de la aŭtomobilaj lanternoj” kaj “Kiam li eksciis, ke lia konduto estas inda je atisto, S-ro Plow subflaris la ofendon” montriĝas netradukeblaj. Ĝenerale, tamen, la versio angla, pli ĝuste usona, estas natura kaj verva; la franca estas tiel preciza kiel permesas la eleganto ŝatata de la Francoj. Oni trovas preserarojn, plejparte en la angla kaj la francaj partoj, sed neniam nedeĉifreblajn.

Katolina Halo

Esperantonimoj, de Marinko Givoje. 2a eldono. Edistudio, Pisa, 1979. Kun desegnaĵoj de W. Bakalov kaj J. Srebnić. Se post ses jaroj libro kun tiel fortimiga titolo bezonas duan, pli grandan eldonon, tio estas bona signo pri la rezistpovo de la Esperantistoj; sed ja, kiel skribas

D-ro Szerdahelyi en sia Enkonduko, la verketo ŝtopas breĉon en la Esperantologio, pritraktante temon semantikan. La diversaj – onimoj ne fortimigu, ĉar ĉiu el ili kaŝas ion jam konatan. *Antonimoj*, ekzemple, estas la *malvortoj*, aŭ aliaj vortoj kun kontraŭa signifo; kaj esperable novaj adeptoj ne kredos, ke la listo sur p.25 iel legitimas por la proza aŭ ĉiutaga uzo vortojn, kiaj *ĉipa* kaj *poka*. Sub *Homonimoj* estas utile listigitaj el PIV 30 vortoj havantaj po 2, 3, aŭ 4 signifoj. Estas pridubinde, ĉu *paronimoj* (la plej longa sekcio) estas parto de la Semantiko; la listo tamen utilos al disleksiuloj. Kontraŭe, al stilistoj utilos la listo de *sinonimoj*, ĉar ili ebligas la nuancigon. Samtempe, oni memoru, ke ĝuste la ĉeesto de nuanco signifas, ke la koncerna vorto ne estas vera sinonimo, kiel Ĝivoje mem rimarkigas en utila Antaŭparolo, atentigante, ke kiam Zamenhof mem volis eviti sinonimojn, li pensis pri tiuj “veraj”, kiuj ne riĉigas lingvon (p.15). Ankaŭ *Vortludoj* estas dubinde semantika temo, sed la klasifado de tipoj dignigas ĝin, kaj la listo helpas rivalemulojn de la senegala Schwartz. Resume, verko de senduba, sed varia utileco, laŭ bezono.

D. B. Gregor

Gramatika Demandaro Resuma, de Julio Baghy. 4a eldono. Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 40p. 14 × 20 cm. Prezo: 6 gld.

Pro tio, ke la verketo baziĝas sur PB² de 1938, ofte laŭvorte redonante ties tekston, kaj sur la *Sintakso* de Fruictier de 1930, mi pritraktos prefere la lokojn, kie Baghy apartiĝas de ili: - *Demandoj* 8, 11, kaj 33: Bedaŭrinde, ke al la priskribo de la Refleksivo, nome, ke “ĝi rilatas ĉiam al la subjekto” mankas la grava kvalifika adjekto de P G 288: “de la plej proksime esprimita ago”, kio estas ĝia “plej distinga karaktero”. *Dem.* 9: Utitla la vorto *sumig pronomo* por la kolektivaj korelativoj (ĉ-). *Dem.* 23: Bedaŭrinda la elekto de *ruligi* (kiu signifas *ruliĝigi*; kp. PIV) kaj *vekigi* (eĉ ne en PIV, kom-

preneble) kiel ekzemploj de faktitivoj (anstataŭ *dronigi* kaj *manĝigi*), t.e. antaŭ la distingado inter transitivaj kaj ntr. verboj *Dem.* 27: Bonvena la korektado de P G per la aldono de *ĉe*, *super*, *sur* al ties 30 prepozicioj. *Dem.* 28: Al la konjunkcioj estas aldonita *nu* (laŭ PIV "interjekcio"). *Dem.* 38: necesas aldoni la averton de P G 343, ke *se* bezonas *nur* por ke la sekvanta Kondicionalo estu klare optativa.

Kun P G, Baghy alskribas "deklinacion" al la substantivoj (*Dem.* 8); sed la supozata "prepozicia" kazo estas mito, ĉar kazo implicas fleksion, kaj prepozicio sen substantiva finaĵo (kiel en la rusa) ne konsistigas tion. Interesa estas la fakto, indikita en *Dem.* 41, ke "la gramatikan karakteron (de la radikoj) oni trovas . . . ankaŭ en E-Hungara vortaro", t.e. supozeble tiu je la fino de la verketo, kie loko estas lasita por alia nacilingva traduko. Mi rimarkis nur tri malgravajn preserarojn (11/-2, 21/13, 22/19), ĉar la dufoja *subordita*, malgraŭ PIV, ne estas tia, (p.23). Eble la plej granda servo de ĉi tiu libreto estas tio, ke ĝi devigas studantojn familiariĝi kun la fakterminoj de la Gramatiko, kaj tiel ebligas al ili (malsame ol la hodiaŭa gramatik-fobia eduksystemo) iam fariĝi lingvistoj.

D. B. Gregor.

Margene de la Lernolibro, de Bernard Golden. Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 60p. 14 × 20 cm. Prezo: 6.60 gld.

La 15 ĉapitroj pritraktas po unu malfacilaĵo de la Esperanta Gramatiko, kiel tiuj sin malkaŝas en la eraroj aŭ variaj uzaĵoj de la verkistoj, kies verkojn Golden diligente kribris. Krom unu, ili aperis inter 1976 kaj 1981 en dektriopo da gazetoj, kaj estis bona ideo retiri ilin el tia "diasporo". Eĉ kie temas pri simpla eraro, Golden trovas ĉiam ion utilan, ja necesan, por diri pri la koncerna punkto. Mi komentos laŭserie: 1. Elparoli S kiel Z estas tutsimple eraro, danĝere dialektiga, kiel prave rimarkigas Golden. Kie

la litero devus esti S pro etimologia motivo (*ekzakta*; kp. *eks-*), estas mia opinio tro malfrue korekti. 2. Oni sidas *sur* fotelo, ĉar ĝi havas fundon; sed ankaŭ *en* ĝi, ĉar ĝi preskaŭ ĉirkaŭas la sidanton: do ambaŭ estas korektaj. 3. La Hungaroj bonvolu lerni, ke *ĉe* la horo 2.45 kaj similaj, la sola ebla Prepozicio estas *antaŭ*; uzi *de* estas hungarismo, do erara. Se ne, ni maltrafos nian vagonaron. 4. La listo de Paronimoj estas pli utila ol tiu ĉe Givoje; sed denove temas nur pri evito de eraroj eviteblaj. (Mi mem ankoraŭ ruĝiĝas, kiam mi memoras, ke mi iam konfuzis *leksikono* kun *leksiko*). 5. *Frunto* por *fronto*: alia paronima eraro. 6. Pritraktante "lektoro" kiel falsan amikon por Hungaroj kaj Angloj, Golden estus povinta menciigi apud la franca listo de Bernard-Ribot, tiun anglan de M. C. Butler. 7. *Akcio* por *agado*: tutsimple eraro priruĝinda. Ankaŭ pri la pseudo-sufiksoj, kia *-cio*, MCB verkis utile en B.E. 1951/63,77,100. 8. La proponataj anstataŭaĵoj de *Akcento* en la signifo de prononc-maniero estas utilaj. 9. La averto kontraŭ la enkonduko de "kalkeoj", kiu radiko mem estas enkondukinda, estas ĝusta. 10 prave rekomendas la Zamenhofan *fotografisto*, malgraŭ *geografo* kc. (kp.B.E 1951/116) Il pledas por *ordi* anst. *ordigi*, citante P G kaj Baghy kaj malgraŭ la komuna uzado kaj PIV. 12 kaj 13 pritraktas erojn de la Esperantigo de Propraj Nomoj: venu la unua la originala nomo sen ŝanĝo. Ĝuste! 14 citas kelkajn fuŝtradukojn, kio bone akordas kun la antaŭe menciitaj eraroj. 15 protestas kontraŭ anglalingvaj glosoj en Esperantaj tekstoj. Plej laŭte devus protesti Angloj.

La ĉi-supraj ciferoj estas miaj. La verketo mem havas nek indekson nek enhav-tabelon, kvankam, kiel konsultlibro, ĝi bezonas ilin. Valoras la penon provizi ilin mem. Ni esperu baldaŭ duan volumon de la multaj aliaj vaste disemitaĵoj de Golden.

D. B. Gregor

“PSIKEDELA” AŬ ‘PSIKODELA’?

Bernard Golden

En letero al la redakcio de *Heroldo de Esperanto* (1671, 3.10.1980, p.3), Caroline Minnaja, aglokula leganto, atentigas pri skriberaro en mia artikolo “La signifo de “diskoteko” en Esperanto” (*Heroldo de Esperanto*, 1667, 16.06.1980, p.4). Mi esperas, ke prof. Waringhien, la ĉefredaktoro de *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV), pardonos min pro mia malĝusta cito de la vortformo “psikodela” anstataŭ “psikedela”, registrita sur p. 1213 de PIV konforme al etnolingvaj etimoj.

Nu, psikanalizistoj, kiuj kapablas sondi ĉiujn aspektojn de nia psiko, klarigas, ke tiaj misaĵoj kaj fuŝetoj kiel lang- kaj plumeraroj ja havas kialon, se oni esploras sufiĉe profunde sub la surfaco de la homa personeco. Estas, do, evidente, ke io en la ortografio “psikedela” ne estas akceptebla al la animo aŭ menso, kiu emas literi ĝin “psikodela”. Kial?

“Psikedela/psikodela” estas helen-devena kunmetaĵo, kies unua elemento, *psyche* (elp. psiĥe), signifas “animo”. La dua morfemo, *del-*, devenas de la adjektivo *delos*, “evidenta, videbla, klara”; la substantivo *delosis* estas tradukebla per “manifestiĝo”, kaj la verbo *deloun* signifas “montri, videbligi, konigi”. Tiu ĉi neologismo en ĉiuj lingvoj datiĝas de la mezo de la 1960-aj jaroj, kiam ĝi estis formita por priskribi grupon de halucinogenaj substancoj, kiujn farmakologoj nomas psikodisleptajoj, ĉar ili kreas en sana persono staton de psikozo. Kelkfoje ili estas nomataj psikozimitaj farmakoj*, ĉar ilia efiko estas nur imiti naturan psikozon kaj ne krei veran mensan malsanon, kiel faras psikozogenaj drogoj.

Por pli precize klarigi la funkcion de la koncernaj halucinogenajoj, estiĝis en etnolingvoj kaj ankaŭ en Esperanto aliaj esprimoj kiel jena ekzemplo ĉerpita el la angla-Esperanta vortaro de J.C. Wells (Londono, 1969), La angla vorto *psychedelic* ne estas esperantigita kiel en PIV, sed tradukita per “psikoklariga” kaj “psikolarĝiga”. Estas rimarkinde, ke tiu koncepto kaj la vorto priskribanta ĝin jam ekzistas dum dek kvin jaroj, sed ankoraŭ ne registras ĝin pluraj alie ĝisdatigitaj konsultlibroj kiel etnolingvaj vortaroj kaj enciklopedioj, kaj eĉ medicinaj fakverkoj.

Revenante al la formo de “psikedela”, ni devas ekscii, kial la unua elemento estas “psike-” kaj ne “psiko-”. La helena substantivo *psyche* rolas kiel internacia scienca prefikso en etnolingvoj kaj kiel pseŭdoprefikso en Esperanto. Tiu ĉi speco de prefikso estas nomata ankaŭ teknika aŭ kvazaŭ-prefikso. “Psiko-” estas uzata sen la vokalo “o”, se la dua elemento de la kunmetaĵo komenciĝas per vokalo (psikastenio, psikiatro), kaj kun “o”, se sekvas konsonanto (psikopatio, psikoterapio). Jen komparo de la samaj vortoj en du etnolingvoj, la angla kaj la franca.

angla: *psychasthenia*, *psychiatrist*, *psychopathy*, *psychotherapy*

franca: *psychasthénie*, *psychiatre*, *psychopathie*, *psychothérapie*

Tamen, en la angla lingvo, tiu regulo ne estas absoluta, kaj troviĝas vortoj, en kiuj *psycho-* staras antaŭ vokalo: *psychoacoustic*, *psychoactive*, *psychoanalytic*. Estas, do, konkludeble, ke en la angla la uzo de “o” antaŭ vokalo estas arbitra. Plej verŝajne manifestiĝas

tie ĉi tendenco uzi nur unu formon, *psycho-*, kiel la unuan parton de ĉiu kunmetaĵo. La plej gravaj esceptoj estas la vortoj *psychasthenia* kaj *psychiatry*. Ankaŭ *psychedelic* estas anomalia formo, ĉar ĝia vokalo estas ne "o" sed "e". Jen unikaĵo, kiu ne havas paralelaĵon. Ne estas iu ajn kialo de tiu ĉi neregula ortografio, ĉar etimologie, la unua elemento de la kunmetaĵo estas la sama kiel tiu en ĉiuj aliaj ĉi-supre pritraktitaj vortoj. Jen la kialo de la skribaro: psikologia rezisto kontraŭ fuŝe formita vorto. Ĝi ja devas esti "psikodela"!

S-ino M. asertas, ke "en neniu el la nacilingvaj vortaroj de mi posedataj ekzistas responda vorto komenciĝanta per "psikodel-..." Estas evidente, ke ŝi ne posedas la 19-an volumon de *Meyers Enzyklopädisches Lexikon* (Mannheim, Wien, Zürich, 1977). Sur p. 361 estas registrita "*psychedelisch* (*psychodelisch*)", kaj sur p. 369 ĉe la vorto *psychodelisch* estas signo resendanta la leganton al *psychedelisch*. Ankaŭ unu verko, kiun s-ino M. ne trafolumis, estas la tria volumo de la hungara medicina enciklopedio *Orvosi Lexikon* (Budapeŝto, 1972). Ĉe *psychodelica* sur p. 1185 estas resendo al la artikolo *psychotomimetica*, kie denove aperas la sammaniere literita *psychodelica*. Jen du ekzemploj de la tendenco en etnolingvoj ĝustigi la misformitan vorton komenciĝantan per *psyche-*, por ke ĝia formo harmoniu en simetria sistemo kun aliaj kunmetaĵoj, kies unua elemento estas *psycho-*.

Mi ne estas la sola esperantisto, kiu volas uzi la formon "psikodela". Alia vortaro, kiu ne estas sur la librobreto de s-ino M. estas *Supplement till Svensk-Esperantisk Ordbok* (Malmö, 1975). En ĝi la traduko de la sveda *psykedelisk* estas "psikodela" kaj "psikolarĝiga". La aŭtoro de tiu ĉi vortaro estas d-ro Ebbe Vilborg, docento pri la helena lingvo ĉe la Universitato de Gotenburgo. Li ja devas scii, kiel esperantigi helendevenajn vortojn.

Ni nun reiru al PIV por legi interesan klarigon faritan de R. Haferkorn, la redaktoro de la teknika-sciencia parto (p. xxviii).

"Mi preferis unuarange terminojn konsistantajn el pure Esperantaj elementoj, kaj nur en tiaj okazoj, en kiuj la precizeco de la nocio estas ne sufiĉe atingebla, mi alprenis neologismon. Ankaŭ ĉe la terminoj, kies internacia formo estas konata precipe inter fakuloj, mi preferas la pure Esperantan formon, ekz. *altometro* aŭ *densometro* (kaj ne *altimetro* aŭ *densimetro*, kiuj internaciaj formoj tamen aperas en la alfabeto ordo kun referenco al la alia)."

Mi opinias, ke Esperantaj vortaroj, same kiel etnolingvaj vortaroj, devas esti priskribaj, ne preskribaj, kaj mi prognozadas, ke la formo "psikodela" estos uzata estontece pli ofte ol "psikedela", ĉar ĝi pli konformiĝas al la strukturo de Esperanto, kiu estas skemeca kaj ne naturalisma. Pro tio estas eble racie modifi etnolingvajn morfemojn por krei interne pli konsekvencajn sistemojn⁽¹⁾

**Gloso* – *farmako* – proponita baza vorto, difinita en la faka literaturo kiel "ĉiu substanco celanta terapion." Sinonimoj estas "kuracilo", "medikamento" kaj "medicinaĵo". La radiko "farmak-" aperas en vortoj kiel "farmak/o/logo", "farmak/o/peo", jam registritaj en PIV, kaj aliaj kiel "farmak/o/gnozo", "farmak/o/terapio" ks.

⁽¹⁾Tiel oni povas pravigi la enkondukon de "farmak/io", ĉar nur la oficiala vortformo "farmacio" ne apartenas al la ĉi-supra sistemo de vortoj formitaj per la radiko "farmak-". "Farmakio" povas kunekzisti kun "farmacio" kiel tolerata formo (same kiel la paro "monarĥo-monarko"), kaj la uzado decidus, ĉu "farmacio" arkaikiĝos.

INTERNACIA JURA REVUO (IJR)

Ek de 1966 aperadas *Internacia Jura Revuo*, sendube unu el la plej gravaj fakaj periodaĵoj en la Internacia Lingvo. La revuo estas la organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ). Ĝi aperas du fojojn jare kun varia enhavo, ĉefe en la sferoj de jura teorio, kompara juro kaj internacia juro.

La 48-paĝa periodaĵo (plus kovriloj), kies teknika redaktoro estas kand. jur. Tom Arbo Hoeg (Norvegio), estas presata en la presejo de la Universitata Biblioteko de Oslo.

Kvankam faka, tamen laŭ la prezentmaniero de la temaro, la periodaĵo estas populara kaj facile komprenebla por ĉiu iom interesita klera persono. La membroj de IEAJ (jara kotizo 150 aŭstraj ŝilingoj) ricevas la revuon senpage. Por aliaj la jarabono estas same 150 aŭstraj ŝilingoj. La kotizojn por IEAJ, la abonojn por Internacia Jura Revuo kaj donacojn por la Fondaĵo IJR akceptas la redaktoro de IJR (samtempe sekretario-kasisto de IEAJ), *D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.*

AŬTUNA HEJMSOPIRO (el "Notlibro de Memekzilito")

Ekster la fenestro falegas nun la pluv';
Batas ĝi la teron kiel la diluv'.
Venton en la arboj mi aŭdas sen esper'.
Pasis jam somero; malvarma la aer'.

Floroj en la koto kliniĝas ĝis la ŝlim',
Dronas en la flakoj sur grund' kaj sur pavim'.
Blovas el la arboj foliojn la tempest';
Kuŝas ili tere, malsekaj, sen protest'.

Ploras la ĉielo kaj ankaŭ mia kor'.
Turnas sin la pensoj al landoj longe for.
Revas kaj sopiras la sentoj pri insul',
Kiu pace flosas sur maro sen makul'.

Tie nun brilegas la suno, kaj zefir'
Movas la frondarojn de palmoj per elspir',
Kvazaŭ el la lipoj de bela junulin'
Dolĉe dormetanta kun bebo en la sin'.

Tie ĉi mi vivas en ĉambro sen hejtil' –
Vivas? Nu, ekzistas – en stato de ekzil'.
Nur en miaj songoj malvarmo fuĝas for;
Venas tamen baldaŭ je frumatena hor'.

Kara hejmo mia, vi daŭre vokas nun,
Kiam en ĉi lando ekhurlas la aŭtun'.
Ĉu la estonteco min portos al la land',
Kie nur sunbrilon spegulas ĉiu strand'?

Tion mi ne scias, sed sen tia esper'
Velkus la animo revante pri liber'.
Pasas do la jaroj kaj pasis la junaĝ';
Freŝa tamen restas la bild' de l' hejmvilaĝ'.

Hugh Clapham

Internacia Lerneja Semajno (ILS) aŭ autune 1986 aŭ printempe 1987

La kontibuo de ILEI al la Jubilea Jaro estos la prezentado de Internacia Lerneja Semajno (I.L.S.).

ILEI intencas pruvi, ke per Esperanto eblas aranĝi senprecedentan lernejan instruadon al infanoj kaj pli aĝaj gelerantoj venontaj el kvin kontinentoj kaj krei inter ili tiun eksterordinaran etoson kiun nur ebligas la travivo de komuna lingvo.

Partoprenrajtaj estas junaj homoj kiuj atingos 1986/1987 la aĝon inter 10 kaj 15 jaroj, escepte ankaŭ se ili limiĝos en 1986/87 al 9 aŭ 16 jaroj.

Geinstruistoj el ĉiuj kontinentoj kaj landoj, kiuj ekde nun deziras kunlabori, estas bonvenaj! Ĉu ili rekte instruos en la I.L.S. aŭ ĉu ili preparos infanojn kaj pli aĝajn gelerantojn— ĉiuj estas kore invitataj. Multaj gekolegoj kaj instruantoj partoprenu en Internacia, Interkontinenta Kolegio.

Sendu vian aliĝon al Helmut Sonnabend, Pappelweg 22 A, D-3150 Peine.

ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minimume 20 vortoj.
Antaŭpagenda.

Free introductory course: All tutors of the Course should send names and addresses of all students to Anny Lawson, 22 Fortismere Avenue, LONDON, N10 3BL.

Press Panel: Please send all cuttings on Esperanto or the language problem *immediately* to Kate Millard, 18 Stirling Road, Brislington, BRISTOL, BS4 3PD.

Local Representatives: If you wish to become a Local Representative of EAB, please contact Muriel Shackleton, 3 Northdale Mount, BRADFORD, W. Yorks., BD5 9AP. Don't forget to add your post code as well as your telephone number.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) celas eduki homojn *per* Esperanto al racia pensado

por faciligi rilatojn inter la laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, ROMFORD, Essex, RM6 6EB.

Volas korespondi:

36-jara inĝeniero interesiĝas pri Britujo kaj britaj kulturo, historio, moroj, ĉiutaga vivo, ktp. Feliks Zygmanski, ul. Leśna 14, PL-33-104 Tarnów, Pollando.

Klára Katona estas 26-jara studentino, kiu interesiĝas pri pedagogio, psikologio, filozofio, lingvoj kaj muziko. Németsvölgyi út. 57/59 H-1124 Budapest, Hungario.

Mary PARHIZGARI, Apt. No 10, No. 8 Mehrdad Ave., Motahari Ave., (Taktate Taroos) TEHRAN, IRANO. lernantino sed ambicias iam traduki artikolojn en Esperanton, volas korespondi kun aliaj gelerantoj.

MEHRDAD KASHEFJ, Talgani Street, Talgani 25, No 9, MASHHAD 91767 IRAN tri-monata komencanto volas korespondi kaj ricevi helpon por akiri librojn kaj gazetojn, kiuj tre mankas en IRANO.

Support the Esperanto Movement's own Travel Agency by making all your Cross-channel Ferry bookings with us. Speedy and efficient service.

Esperanto Holidays Association,
Nacton, Ipswich.
Telephone: 0473-79300